





# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: FF 15,00
CCP 956-28 MONTPELLIER

3a kvaronjaro - N° 90


La letero de la Prezidanto,

QUITTE ou DOUBLE / REZIGNI aŭ DUOBLIGI

Ĉiuj el vi konas tiun radiofonian ludon. Ĉu riski denove, eventuale ĉion perdonte aŭ... gajnonte multe pli, ĉu foriri, kontenta pro la akiritaĵo?
Tiu ludo spegulas la sintenon de ĉiuj esperantistoj. Ĉu utilas plue aktivi en la movado aŭ ne? Certe ili metis grandajn esperojn sur la nunan registaron, sed al ili ŝajne ne venis la atendita rezulto...
"Ni fosu nian sulkon", ofte ripetas iu konata federaciano. Batalo perdita ne signifas perditan militon! Ni duobligu niajn strebojn, kaj ĝis du jaroj, ni estu pretaj por la Jubileo.
Iom post iom tutmondiĝas nia Lingvo, tuŝante la ĝis nun neatingitajn aŭ perditajn lokojn. Tion evidentigas la fakto, ke proksimaj Kongresoj okazu en Azio (Pekino), Aŭstralio kaj Afriko (Kenjo).
Je nia regiona nivelo, ni ne ĉesigu niajn iniciatojn. Ju pli da elpensitaj entreprenoj, des pli da progresoj, sed nur kondiĉe, ke ĉiuj kunlaboru: nombro estas socia forto.
Plej gravas taŭga publika informado. Tial ni petas ĉiujn esperantistojn transdoni la de ili konatajn informojn al unu el la sube listigitaj animantoj, kutime ilin informi pri ĉiuj lingvaj kaj esperantistaj eventoj kaj okazoj, kursoj, gazetaĵoj, ktp... -Tiel, ni informos la informantajn esperantistoj trafe al la publiko, per jusdatigitaj faktoj eldonitaj en nia federacia bulteno. Nova taĉmento respondecas pri ĝi, ni bezonas vin.
Ni kore dankas tiujn, kiuj ĝis nun prizorgis nian bultenon, tute aparte nia amiko R. FRUS, kiu presis dum multe da jaroj. Provizore S.F.S estu nur sespaĝa. Li grandiĝos ju pli, des pli ĉiuj kontribuos. Ve! financan apogon ankaŭ ĝi bezonas. Tial, ni estos devigataj ĉesi la sendon al ĉiuj, kiuj forgesas reaboni. Eĉ donacu iom pli: la financa situacio deficitas! Vere, nunatempe ĉu 15 FF,00 jare ne estas ridinda?
"Rezigni aŭ duobligi"? - Ni kalkulas je via MALrezigno.

J.H.



| | | | |
|---|---|---|---|
| Prezidanto | : J. Hénin | Rte de Montcayroux | 48500 La Canourgue |
| Vic-Prezidantino | : Y. Vierne | 5 rue Dr Roux | 34000 Montpellier |
| Sekretario | : J. Amouroux | 1 rue de Sorède | 66000 Perpignan |
| Kasistino | : L. Négron | 40 chemin des Amandiers | 34400 Lunel |

# FEDERACIA KOMITATA RAPORTO

S-ino Irma Proud'hon, anino de la Grupo Beziers, tre simpatie kaj delikate, akceptis nin en sia hejmo, en Maraussan. Tiuokaze ni povis pli bone konatiĝi kun tiu varmkora samideanino kaj propra-okule admiri ŝian pentristan talenton. Al ŝi iru niaj apartaj dankoj pro la sukcesa arangô de nia laborkunsido. Je la 10a 30mn, Jean HENIN (J.H.) malfermis la kunvenon, kiun, plus deko da samfederacianoj, partoprenis ok komitatanoj, inter kiuj Frédéric MAURIN (F.M.), nun deĵoranta ĉe U.F.E.-a sidejo en Parizo; kvar pliaj komitatanoj skribis aŭ telefonis, sed tri eĉ ne sendis rajtigilon.

J.H. substrekas la pozitivan rezulton de nia lasta federacia kongreso en MILLAU: establitaj kontaktoj, retrovo de esperantistoj kaj novaj lernantoj. Li krome notas, ke pliaj nomoj aldoniĝas, el nia Federacio, en la jarlibro de U.E.A. :Raymond DOURY (R.D.) kaj Jean-Pierre PERAY (JPP) en Béziers, J.H. en la Canourgue, Paul TOURON (P.T.) en Nimes. J.H. raportetas pri la efiko de partopreno en nun disvastiĝanta "Foiro de la Asocioj", en Maurin kaj Montpellier.
Estas tre trafa okazo por diskonigi esperanton. R.D. verkos por la regiona gazetaro kaj J.P.P ĝin kontaktos cele diskonigi la esperantistan vivon. Ili do bezonas ĉies helpon por ricevi la diskonigontajn nepre necesajn informojn (v-d. en la 'letero de la Prezidanto').

Koncerne la relanĉon de la kursoj, bonaj perspektivoj naskas en Perpignan, Béziers, Montpellier kaj la Canourgue (ĉilasta, malgraŭ kelkaj malhelpoj pro lernigo de la okcitana lingvo). Ankaŭ pri la kursoj ĉiam nepre necesas informi (vd. supre) cele al reklamo al la publiko. La principo de nova lingvostaĝo en VALRAS estas konfirmita kun antaŭvidita dato je la 16a de majo 1985 ('Ascension'). Se ne eblos okazigi nian venontjaran federacian kongreson en iu Gard-a urbo (Anduze?), nia kongreso povos okazi dum la dimanĉo lige kun la lingvo-staĝo en VALRAS. Memore dirite : la UFE-a kongreso okazos je Pasko 85, en 'ANGERS' Kadre de nia estonta kongresa principe konsentis ĝin alvoj̄aĝi, por prelegi, Prof. JANTON, tio espereble allogos la publikon.

J.H. mencias, ke kontentige progresas la laboro pri la turismbroŝuro kaj alvokas al ĉies kunlaboro. J.H. poste legas leteron de Robert FRUS (R.F.) anoncanta, ke la nimesa taĉmento, inkluzive de S-ino SOULTER kaj S-ro CARREY, rezignas pri la eldono de SUD-FRANCIA STELO. Ni dankas pro la farita laboro, sed ni devas trovi solvon, konsiderante la ĝisnunan deficiton kaj la malaltan prezon je 15 FF,00. Jean AMOUROUX (J.A.) sugestas prikonsideri la fakton, ke, subforme de tri ambaŭflanke fotokopiitaj folioj, S.F.S. estu enkoverte sendata. Laŭ la nuntempa ordinara poŝta tarifo, la poŝtsendo kostos jare 1,70 x 4 = 6,80 FF, kaj el la abonprezo restos 15,00 - 6,80 = 8,20 FF. La demando estas: ĉu sufiĉe, des pli ke, de tempo al tempo, utilos pli dikan numero? -F.M. diras supozi, ke UFE povus pristudi la eblecon: prepari la netan eldonaĵon surbaze de la malnetoj; enkovertigi kaj sendi la poŝtaĵojn laŭ aparta prezo je 0,62 FF, al la SFS-abonantoj. Sed, komprenèble U.F.E. eble petos federacian kompenson sub formo de plialtiĝo de la kvanto de federacianoj aliĝantaj al U.F.E. Pri tiu sugesto, J.H. debatos kun la Prezidanto de U.F.E.
Dume, ĉion por S.F.S., oni sendu al J.H., kiu nun helpata de agemaj bonvoluloj, plutenos la S.F.S. torĉon. Nia Federacia kasistino, S-ino NEGRON jam akceptas la (re)abonon al S.F.S. por la nova jaro..

Tiu jarabono restas momente je 15 FF,00 , sed tre urĝas, ke ĉiuj membroj ĝin tuj sendas; ĉefe tiuj, kiuj ne ankoraŭ pagis la 1984-an - Ne prokrastu, estas afero de conscienco!

S-ro LLECH-WALTER (L.L.W.) bondezire salutos la 20-an Katalunan Esperanto-Kongreson en OLOT, nome de nia Federacio.

J.H. kaj F.M. atentigas pri interesaj eventoj en nia "Verda Mondo": staĝo pri librotenado kaj administrado en Lyon -pri tio, F.M. pretas disponogi iom da mono el la vendprofito de la Verda Libreto de U.F.E.-, staĝo pri informatiko en Rennes, dua festivalo arangôta de U.F.E. en Parizo, ktp...
La tagordo elĉerpita, la laborkunsido leviĝis.

Pro iome aĉa vetero, ĉefe ventega, S-ino Irma Prud'hon disponigis al ni siajn salonojn por niaj kunportitaj manĝadoj, plie, kun simpatia F-ino andré ROQUES, el NISSAN, ili regalis nin per aperitivoj, trinkajoj, desertoj sub fono de amikeca etoso. Posttagmeze, pluraj el ni sin retrovis por la vizito de la praurbo kaj ties muzeo ĉe ENSéRUNE.

protokolis: Jean AMOUROUX.



INFORMU, INFORMIĜU, PARTOPRENU !!!,
sendante informojn al la bultena redakcio pere de la federaciaj Respondeculoj.
Esperantismajn dankojn.

Letero el 'Nimes' (nim)

ANTAŭ la KVADRATA DOMO

Ĉiumatene mi pasas antaŭ la "Kvadrata Domo", kies elegantajn kolonojn orumas la frua sunlumo. Ĉiufoje mi rigardas kun admiro la harmoniajn proporciojn kaj la delikate belajn detalojn de tiu romia templo de greka stilo.

Per la imago mi vidas,antaŭ ĝi, pasantajn urbanojn el la tempo de Aŭgusto. Drapire volvitaj en ampleksaj togoj, ili parolas en la lingvo de Vergilio kaj de Cicerono. Latino estas komuna lingvo tra la tuta imperio.

Jarmilo pasas. Latino restis komunikilo kaj esprimilo de la tuteŭropa klerularo, sed en la popola uzado ĝi disfalis en grandegajn idiomojn. Tiam la mezepokaj nimusanoj parolas okcitane.

Post kvin, ĝis ses jarcentoj, latino perdis sian rolon de internacia kulturlingvo, anstataŭita de la franca. Ĉiuj eŭropaj intelektuloj parolas aŭ almenaŭ skribas la lingvon de 'Descartes, 1596-1650' (Kartezio), de 'Pascal, 1623-1662' (Paskal) de 'Voltaire, 1694-1778' (Volter). Tamen, kvankam oficialigita de la reĝo Francisko la 1a, ĝi ankoraŭ ne penetris en la popolajn tavolojn. En siaj kunsidoj la brila Nimesa Akademio ja uzas la francan lingvon, sed la ordinaraj homoj daŭre parolas sian okcitanan nimesan dialekton.. Kaj jen ni alvenas al la nuna epoko. Nun, ĉiuj nimurbanoj parolas franclingve, sed la franca lingvo ne plu estas internacia. Multaj diverslandaj turistoj vizitas kaj fotas la monumenton, kiu tie staras de antaŭ preskaŭ dumil jaroj. Ĉiu parolas sian nacian lingvon, kaj neniu el tiuj lingvoj estas internacia.

Tamen ekzistas unu internacia lingvo, sed kiom ĝin praktikas? La nimesa loĝantaro proksimiĝas al ducent mil. El tiu nombro, kiom da esperantistoj nombriĝas? Apenaŭ tridek, kaj inter ili kiom aktivas? Ne multe pli ol dek. El la opa cetero kiom havas seriozan scion pri la Lingvo Internacia? Kiom, eĉ neniam, aŭdis aŭ legis pri la lingvo Esperanto?

Ĉu ni, nimesaj esperantistoj, ne devas honti?

Valo

Noto de la Prezidanto- S-ro Laval levas gravan problemon: ĉu la esperantistaro sufiĉe informas la publikon pri la Internacia Lingvo?

---

*** sube: sekvo de la paĝo 5a -

DUA PARIZA FESTIVALO, 24-25 XI, kanzonoj k teatro, UFE peros hotelojn.

PRELEGVOJAĜO de Hungaro tra nia FEDERACIO, fine de NOVEMBRO 1984: Dro Istvan GETHER, universitata doktoro pri ekonomiko, 35 jaraĝa, parolos pri la hungara ekonomio: ĝiaj atingoj kaj problemoj, li respondos demandojn.

Tagoj de la HOMRAJTOJ (do: ankaŭ rajto je KOMUNIKADO): 10 XII

Internacia E-o Semajno en NICE: 30 III ĝis 6 IV 1985.

NACIA KONGRESO U.F.E. - dato ne ankoraŭ findecidita, eble en ANGERS, dum la Paskaj ferioj, 6-8an de aprilo 1985.

Pro tio, nia FEDERACIA KONGRESO tutescepte ne povos okazi antaŭe.

LINGVO-STAĜO en VALRAS, de la 16a ĝis 19a de majo 1985.

UNIVERSALA KONGRESO - AUGSBURG (Germanujo) 3-10 VIII 1985

La du supraj okazaĵoj, je datoj malproksimaj ebligos trapasi du semajnojn en INTERNACIA ETOSO.

JUNULARA KONGRESO 22-29 VII en Eringerfeld

11-18 VIII: POST-KONGRESO en Kronach.

# OKAZ' IS - AS - OS EN NIA FEDERACIO ...

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

MONTPELLIER- Esparanto budo prezentis la internacian lingvon okaze de la foiroj en Maurin kaj Montpellier. Multaj demandoj venis de gejunuloj. En Maurin, G-oj CELIQUA starigis kurson por komencantoj.Gi prosperu La kurso en "Centre de la Jeunesse",impasse de la Corraterie-Montpellier, okazas ĉiusemajne, jaùde je la 18a horo.

SETE- La nune tradicia Esperanto-Semajno disvolviĝis glate kun la partopreno de kvarda esperantistoj. Venis homoj el JUGOSLAVIO, GERMANIO, ĉEKOSLOVAKIO kaj USONO (Alaska), tiel vera etoso internacia!

LA CANOURGUE- (Lozère) - Isabelle kaj Patrick HéNIN unuafoje ĉeetis la Junularan Kongreson en Swanwick (Britio). La tuta familio vizitis Kimrujon kaj konatiĝis kun la respondeculoj de la nova kimra Federacio. La problemoj de tiu federacio similas al la niaj. Por la unua fojo, la Brita Kongreso okazos en Kimrujo: Llandudno.

PERPIGNAN- La N° 3a de "Tramontano" aperis kaj menciis plurajn freŝdatajn eventojn. En aùgusto, esperantistoj kunvenis ĉe la vilao de S-ro LLECH-WALTER, "Sunradio" en Argelés. "Tramontano" ankaù men cias, sen dato, la renkontiĝon improvizitan en Cerbère, inter kelkaj grupanoj kaj trideko da Polaj fervojistoj, el kiuj dek esperantistoj. Bonega propagando!

Kursoj okazas en la Kultura Centro:
lunde, 17-18h. -duagrada
18-19h. -tria grada-konversacia
marde, 16-17h. -duagrada
17-18h. -unuagrada

Jean AMOUROUX kaj la Grupo USCM organizis, fine de septembro, ekspozicion en la kvartalo "Moulin à Vent". La gazetaro raportis pri la evento; "L'Indépendant" publikigis: "Cette exposition est surtout axée sur les applications de l'E-o dans les techniques nouvelles comme l'informatique, et sur sa diffusion, par exemple en Chine, où son explosion tout azimut laisse présager que le 71ème Congrès Universel d'Eo qui aura lieu à Pékin, donnera encore plus de dynamisme aux perspectives de la Langue de Zamenhof"
Kursoj komenciĝis en la lernejo H. Rigaud.

NIMES- Jam de kvin jaroj, ĉiulunde parol-iga kurso okazas de la 4a ĝis la 7a h. en CENTRO PABLO NERUDA.Ceestas dek samideanoj, inter ili nia sindonema amiko S-ro REYNAUD, kies esperanto-scio alportas al ni multajn profitojn. De temp' al tempo, S-ro LAVAL plezurigas nin per interesaj kaj informdonaj artikoloj de li verkitaj. Pasintan jaron S-ro CARREY, Prezidanto de nia Grupo kaj profesoro pri muziko en C.E.S. Daudet et Feuchère gvidis esperanto-kurson por 26 lernantoj en C.M.2, placo 'Belle-Croix'.
Car tiu kurso estis efik- kaj profitdona, ni esperas, ke ĝi ĉijare denove okazu. S-ino VOLPELLèRE gvidas, en sia hejmo, la tri nivelajn kursojn, kun ses lernantoj. La 15an de oktobro, la grupanoj, sub la gvidado de S-ro TOURON, ĉiam entreprenema, ekskursetos enkampare kun la klubanoj de la "Libera Tempo", cele amike promeni, sed ankaù provi propagandi Esperanton. Gis nun kvar Nimes-anoj aliĝis al la RODANA ESPERANTO-RENDEVUO, organizita de LITERATURA FOIRO-KOOP., (Pri tio, vidu alipaĝe.)

ALèS- En Alès, kurso gvidata de S-ro PELLETIER kaj S-ro BELLA okazas ĉiumerkrede ĉe "Centre Aéré Municipal du Mas SAGNIER", kun kvin lernantoj.
Car, aliloke, en BILANA -Ceĥoslovakio, ĝemelita urbo de Nimes, okazas simila kurso, estiĝas ebleco de reciproka porinfana gastigado. Jam pasintan jaron, du junaj ĉeĥoj gastis en Alès, kaj unu Alès-ano reciproke en Bilina. Tia entrepreno indas niajn laùdojn. Ciuĵaùde, de la 5a ĝis la 7a, S-ro PELLETIER dejoras je la dispono de la interesotaj ĉe "Centre Culturel Communal", donante informojn.
Ciuj informoj donotaj ĉe: CENTRE CULTUREL ESPERANTISTE, 10 Gde Rue, 30000 Nimes - aù: S-ino G. SOULIER 213 av de Camargue, 30132 Caissargues

BEZIERS - vidu paĝon 6an.

## R E G I O N E ...

*Dankoj de la FEDERACIA KOMITATO - Anonimulo donacis FF100 por "Sudfrancia Stelo" Ni elkore dankas tiun donacemulon. Tiu donaco multe helpos la pluvivon de nia Federacia Bulteno; sed...aliaj estos akceptitaj.*

*REGIONA TURISMA LIBRETO - La Turisma Libreto pri Langvedoko-Rusiljono estas survoje. Venis pluraj kontribuoj, sed ankoraù mankas la plimulto. En la lasta SFS, vi legis pri MILLAU. Kiu volas prezenti, sur du ĝis kvar paĝoj, sian urbon kaj ties ĉirkaùaĵoj, kun iliaj vizitindaĵoj, sciindaĵoj, krome informoj, utilaj adresoj, ktp... ? Dankeme al tiuj.*

## ĈE NIAJ NAJBAROJ
****************

Norde - Seminarioj en COURNON: por la komencantoj, 27-28an de oktobro 1984
por la perfektiântoj, 4-5an de novembro.

Okcidente - Raphaëlle ALBAULT demisiis pro profesia motivo. Dr André ALBAULT reprezidantiĝis en Federacion Midi-Pyrénées.
La Grupo de TOULOUSE invitas vin al la "ROZKOLORA URBO", por vizito de ĝi, esperantlingve gvidita, la 18an de novembro 1984.
Ankaù provo estos de ĥoro laù la formulo: per la kanto al Esperanto

Sude - Okazis la 20a KATALUNA KONGRESO de la 12a ĝis la 14a de oktobro en OLOT (landlimo Francujo-Hispanujo). Strato "Doktoro ZAMENHOF" estis inaùgurata Inter aliaĵoj, oni pritraktis la enkondukon de Esperanto en la Katalunan Parlamenton.
Reprezentis nian Federacion S-ro LLECH-WALTER kaj pluraj Nord'Katalunoj. "KATALUNA ESPERANTISTO" regule mencias niajn aranĝojn.

Rodane - vidu sube, Rodana Rendevuo.
En AVIGNON, Zamenhofa Tago, kun prelego pri Champolion kaj bildoj pri Ĉinio.

sekvo pĝ 3a

# unua Rodana Esperanto-Rendevuo

Pour la première fois la Société coopérative de *Literatura Foiro* organise un week end culturel dans le sud de la France, en collaboration avec la Fédération espérantiste de la Vaucluse.

La manifestation s'articulera selon trois groupes d'étude, samedi après midi et dimanche matin. Le soir du samedi aura lieu un programme commun, avec discothèque espéranto.

Dans le *Rodana Esperanto-Rendevuo* le groupe A, pour débutants, sera animé par Perla Ari Martinelli, institutrice italienne, rédacteur-en-chef de la revue *Literatura Foiro.* Il s'agira d'un cours d'initiation à la langue, qui permettra de s'intégrer dans le milieu international espérantophone. La méthode a été spécialement étudiée pour ces stages.

La grupo B, por progresantoj, analizos la gramatikon de esperanto kun speciala atento pri ĝia evoluo. La grupon

**en Avignon, Francio**
**Kastelo de La Barbière**
**27-28 oktobro 1984**

gvidos d-ro Giorgio Silfer, itala lingvoinstruisto, aùtoro de la unua interlingvistika disertacio en la itala akademia mondo.

En la grupo C, por fluaj parolantoj, d-ro Michel Duc Goninaz, universitato de Aix-en-Provence, pritraktos la temon *Enkonduko al slavaj lingvoj.* La slavaj lingvoj estas aparte gravaj, por kompreni multajn fenomenojn en la Esperanta kulturo: la grupestro estas verŝajne la plej kvalifikita franca esperantologo, tiuteme.

...kaj, ĉar kutime en Esperantujo la informoj tro ofte malfruas, vi legos tiun gravan interesan inviton kiam... la Rendevuo finiĝis! Pardonu nin.

la grumblanta redaktisto

Kursoj- Dank al la alveno de novaj esperantistoj oni povis starigi du kursnivelojn kaj plie unu vesperkurson por lernantino, kiu dejoras dumtage.
Rilatoj kun eksterlandanoj- Kiel kutime la Grupo estis preta akcepti preleganton. Bedaùrinde, li ne ricivis vizon. Ankaù kvar samideanoj de Heilbronn planis vizitis nin okaze de la staĝo en Valras sed lastmomente ili rezignis pro malsano de la ŝoforo. Tamen komenciĝis interŝanĝo de leteroj kaj kasedoj kun la gelernantoj de Heilbronn. Post invito de grupanino, ĉeka esperantisto S-ro Karel Kratochvil vizitis Beziers-on dum unu monato kaj duono. Li havis la okazon renkonti multajn esperantistojn, kaj antaù la fino de lia restado ni komune manĝis en restoracio.
Kongresoj- Kvar membroj partoprenis la S.A.T.-Amikaran Kongreson en Draguignan, dum Pasko. Ses membroj ĉeestis la Federacian Kongreson en Millau, 19-20/5/1984. Du grupanoj vojaĝis al Britio por partopreni la tiean Nacian Kongreson en Weston-super-mare. Tio ebligis renkontiĝon kun enloĝantoj de la Beziers-a ĝemeligita urbo Stockport. Dum la postkongreso en Londono, ili estis afable akceptitaj en la Londona Grupo.
Renkontiĝoj- La 18an de decembro, kiel ĉiujare, ni festis la Zamenhofan Tagon en nia klubejo: komuna manĝo, filmo, kantoj. De la 28a/4 ĝis la 1an/5, la Grupo de Beziers organizis semajnofinan staĝon en Valras. La partoprenantoj, proksimume dudek, povis elekti inter tri kursniveloj. La respondeculoj trapasigis ekzamenojn: ses kandidatoj sukcesis la unuan gradon, du la duan. En septembro, de la 9a ĝis la 16a, okazis la Mediteranea semajno en Sète. Ok membroj ĝin partoprenis. Nia Prezidantino gvidis kurson por komencantoj. Unu distra vespero organizita de nia grupo: teatraĵo, muziko, kantoj, ricevis sukceson, kiu tre ĝojigas nin. La Esperantista Grupo de Montpellier, organizinto, invitis jugoslavian profesorinon kiu gvidis esperantan kurson duagradan, ankaù du Alaskanajn Usonanojn, kiuj prezentis sian landon per diapozitivoj esperantlingve komentitaj.

Pro la alta prezo de la poŝtmarkoj, la Generala Asembleo decidis provi sendi nur po du kunvokiloj jare. Ĉi tie, vi ricevas la unuan.

Kiel la lastajn jarojn, ni kunvenos kutime en nia klubejo: la unuan sabaton ĉiumonate. Sed plie okazos dua monata kunveno ĉe la grupa sidejo: 9, strato Picot, Béziers - je la subaj datoj. Ili redonos sabattagajn temojn, intence al la membroj neliberaj sabate, sed ankaù al ĉiuj, kiuj deziras pli ofte praktiki Esperanton.


# CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO

9, Rue Georges-Picot - 34500 BÉZIERS

C.C.P. Montpellier 1606-29


(J.O. N° 238 du 11 Octobre 1964 & 257 du 4 Novembre 1973)

★

Por certigi taùgan preparadon, vi estas petata anonci vin skribe, kaj sendante via(j)n prezpartopreno(j)n per reira poŝtaĵo, almenaù antaù la 10a de decembro.

Vi povas, eĉ estas konsilite, inviti geamikojn.

Vi povis legi dorspaĝe la agadraporton de la Grupo dume 1983-84. Via grupa Estraro feliĉe interesiĝos scii vian opinion pri la inta agado ankaù viajn sugestojn por la estonta.

Por la periodo 1984-85, la Generala Asembleo taksis la jaran kotizon por la Grupo je 30 FF,00 Pagante kiel eble plej frue, vi helpos vian grupon kaj ĝian Kasistinon. Ĉiuj estos dankindaj al vi.

Ni deziras al vi, ankaù al nia Grupo, fruktodonan esperantistan laboron, kaj ni certigas vin je nia amikeca helpo por tion celi.

nome de la Estraro,
la Prezidantino,

Suzanne Authier .

| | sabaton | mardon | |
|---|---|---|---|
| octobro | | 23an | Raporto pri staĝo en Lyon / Rapport sur un stage à Lyon |
| novembro | 3an | 20an | Schwartza literaturo / Dans la littérature de Schwartz |
| decembro | 1an | | Pri pentrado kaj pentristoj / sur la peinture et les peintres |
| januaro | 5an | 15an | Moncivitaneco / Citoyenneté mondiale |
| februaro | 2an | 19an | Pri muziko kaj muzikistoj / Sur la musique et les musiciens |

DIMANĈON la 16an de decembro: ZAMENHOFA TAGO
de la 14a horo — distra posttagmezo / aprés-midi variétés: théâtre, film, jeux, chants
je la 16a k. 30 — kampara bufedo / buffet campagnard

Bufeda prezpartopreno / participation aux frais du buffet: 25 FF,00